# ATEISMO

## BULTENO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO




**Religia diverseco en la usona Supera Kortumo**

*(Fonto: www.supremecourt.gov - vortoj aldonitaj)*

**Majo 2022**

N-ro 34 | www.ateisto.org

# VORTO DE LA REDAKTORO

De pli ol du jaroj, la mondo trairas grandegan krizon, tiu de la kovida pandemio. Kaj fakte la pandemio ankoraŭ viglas. Tion mi mem povas atesti, ĉar mi, malgraŭ triobla vakciniĝo, infektiĝis dum longa vojaĝo reen el Usono post kvarsemajna restado. Estis ĝuste pro tiu subite necesa restado kaj sekve la malsaniĝo, ke tiu ĉi numero tiom malfruas. Pro tio, mi pardonpetas al vi, la membroj de ATEO, sed espereble vi komplezos per komprenemo!

Nu, ankoraŭ trairante la pandemion, la mondo ektroviĝis en nova krizo: la grandskala invado lanĉita de Rusio kontraŭ Ukrainio. Por mi, loĝante tuj apude en Pollando, ĝi estis ege ŝoka evento. La brutala, senprovoka militagreso daŭras. Ukrainio heroe kontraŭbatalas multe pli fortan kaj tute senmoralan malamikon. Dek miloj da senkulpaj civiluloj estas mortigitaj de la agresantoj, multaj urboj detruitaj. Al Pollando forfuĝis pli ol du milionoj da ukrainoj. La temoj, kiujn tiu ĉi bulteno normale traktas subite ŝajnis ne tro gravaj. La divido inter di-kredantoj kaj nekredantoj fariĝis preskaŭ sensignifa. Milionoj da ordinaraj homoj, kun diversaj mondrigardoj kaj politikaj opinioj, sed plejparte ortodoks-kristanoj, trovis sin en terura situacio.

Tamen, indas iom pripensi la aferon lige kun la interesoj de ni ateistoj. Por multaj ukrainoj certe ilia religia fido subtenas ilin dum tiu ĉi terura suferado kaj ni devas respekti tion. Mi vidis kelkfoje video-raportojn, en kiuj ukrainoj diras, ke ilia lando venkos kun la helpo de Dio, ke Dio estas je la flanko de boneco kaj justeco. Aliflanke, iuj eble demandas sin: “Kie estas Dio?” “Kial Dio permesas tian teruraĵon?” Por ni ateistoj, la ekzisto de malbono kaj suferado estas forta indiko de la neekzisto de Dio, kaj samtempe, la ekzisto de bono ne indikas la ekziston de Dio. Sed el tiu ĉi nune okazanta tragedio ne decus fari argumentojn por nia pozicio.

Ni rigardu ankaŭ la rilaton inter la agresantoj kaj religio. Kiel mi priskribas en artikolo ĉi-numere, la Putin-reĝima invado estas subtenata de la Rusa Ortodoksa Eklezio (kvankam grupo de ĝiaj klerikoj esprimis kontraŭon). Por la eklezia patriarko, la invado estas eĉ sankta afero, dia laboro. Kvankam mi dubas, ĉu Putin estas vere kredanto, li ŝajnigas, ke li estas fidela ano de la eklezio. Rus-ortodoksismo ja estas delonge grava elemento de rusa naciismo kaj rusa imperiismo, kaj la Putina reĝimo plene ekspluatas tion.

En la granda, malhela ombro de tiu aĉa milito, la redakcio preparis novan numeron de la bulteno. Kiel kutime ekde la jaro 2020, ni prezentis demandon al la niaj legantoj. Ĉi-foje ĝi estis: “Ĉu estante ateisto, oni povas / rajtas samtempe senti sin ano de religio?” Bedaŭrinde respondoj malabundis, do la redakcianoj mem kontribuis, kune kun du aliaj asocianoj, kaj ankaŭ araba Esperantisto el ekster nia asocio. Mi esperas, ke vi trovos interesaj tiujn ĉi tekstojn kaj ankaŭ la alitemajn. Inter ĉi-lastaj, malĝojige, estas memor-artikolo omaĝe al Claude Nourmont, kiu refondinte ATEO-n en 2000, servis kiel ĝia prezidanto dum pluraj jaroj. Ni adiaŭas ŝin elkore.

# Islamo kaj senkredeco: kiel kvadratigi la cirklon

*Abdullah ibn Al-Mufaddal (loĝas en araba lando)*



*Medino, la dua plej sankta urbo por islamanoj, sed islamo estas pli ol kredaro (Fonto: britannica.com)*

Komenc-paŝe, mi prezentu tiun ĉi "caveat lector" (avertiĝu la leganto): kiam mia kara interreta amiko Nyegosh petis de mi skribi pri tiu ĉi temo, mi respondis al li (dankinde, li estas pacienca homo), ke eble mi ne plu havas la lerton alparoli eŭropan legantaron. Precize pro tio, ke dum la lastaj jaroj mi kutimiĝis diskuti nur kun mezorientanoj kaj sudazianoj. Mi tiel faradis, kompreneble, ne pro diskriminacio (kio nepre ne estu negative komprenita en ĉiuj kazoj) sed simple pro hazardo de cirkonstancoj. Nyegosh afable rememorigis min, ke kiam oni parolas racie kaj klare, ne gravas al kia kulturo apartenas la leganto, ĉu orienta, ĉu okcidenta, aŭ, kiel tre ofte ĉi-epoke, interkultura.

En artikolo eldonita en 1990, David Dvorkin klarigis kial li ne plu estis judo ("Why I am Not a Jew", revuo *Free Inquiry*). Tie li skribis, ke estante judo kaj ateisto, estis malfacile por li trovi informojn pri homoj, kiuj havis similajn spertojn, ĉar la granda plimulto de Okcidentaj ateistoj apartenas al kristana fono. Li devis sole kaj senprecendece ekserĉi sian vojon al ateismo. Kiam mi trovis tiun artikolon, mi estis 20-jara liberema ŝijaista islamano, kaj studento de dentomedicino, loĝanta en la Mezoriento. Tamen, mi tuj sensis la parencecon inter mia daŭre formiĝantaj spertoj kaj la matura spertaro de racia juda usonano.

Antaŭenirante al 2016, mi legis kaj spektis ĉe YouTube filmon pri la publikigo de libro de Pakistan-devena eks-islamano nomita Ali A. Rizvi. Surpriza titolo de la libro: *La Ateista Islamano* (The Atheist Muslim, St. Martin's Press, 2016). Ni memoru, ke temis tiam pri la ora epoko de la novaj ateistoj, kies gvidantaj figuroj estis Dawkins, Hitchens kaj amikoj. Tiu movado, nun tiel morta kiel Hitchens, renkontis malnoblan kaj malĝojigan finon pro la interveno de la usonaj "vekuloj".

Kelkaj miaj ne-islamanaj amikoj miris: ĉu vere eblas esti ateista islamano? Ĉar ili kreskis kadre de kristana kultura etoso, ilian konfuziĝon mi komprenis. Kristanismo estas ĉefe spirita religio, bazita je kredo kaj fido. Male, judismo kaj islamo intersimilas pro tio, ke ili pli koncerniĝas pri tradicio kaj vivmaniero. Malgraŭ siaj diferencoj, islamano kaj judo tuj rekonas siajn komunaĵojn: la tradiciaron, la gravecon de religia leĝaro (la juda Halaĥo kaj islama Ŝario, kaj tial la centrecon de religiaj spertuloj, kiuj gvidas nin "sekvi la leĝon"), de komunumo, kaj de savado per agoj.

Tial, en la libro de Ali Rizvi (kiu, parenteze, apartenas al ŝijaisma-islama familio, same kiel mi), mi tuj vidis validecon. Li klarigas, ke eĉ kiam islamano iĝas ne-praktikanta, liberemulo aŭ ateisto, li/ŝi pro neceso devas ŝajnigi sin islamano; ĉar, alie, li/ŝi suferos pezegajn sekvojn. Krome, kiel mi persone spertis en Eŭropo kaj en aliaj ne-islamaj regionoj, la premo prezenti sin kial islamano sentiĝas ankaŭ eksterkulture, kie multaj homoj volas senpense kaj senhezite kategoriigi min. Tute ne kontentigus ilin, ekzemple, se mi dirus, "Fakte, ne, mi ne estas "tradicia" islamano. Mi elektas, laŭ mia propra volo, kiun parton de mia kulturo kaj religio mi emas sekvi." Tute ne: plej ofte mi trovis ke, eĉ inter mondume pensantaj esperantistoj, estis nek la tempo, nek la emo, kompreni tiajn nuancojn. Fakte, mi memoras, ke dum iu UK, alie klera esperantisto rimarkis min fari ion iomete ne-islaman kaj ekkriis: "Eĉ vi! Mi pensis, ke vi estas islamano!" Do mi konkludis, ke ĉiam pli facilas deklari min lojala filo de Islamujo, eĉ se tre ofte (eble pli ofte ol mi deziris), kaj aparte dumvojaĝe, mi ne plenumis ĝiajn regulojn.

Sed koncerne nian centran demandon: Kiasence, se tio eĉ eblas, povas oni esti ne-praktikanta islamano? Mi respondu el mia persona sperto, kaj ankaŭ anekdote, surbaze de la spertoj de tiuj, kiujn mi konas. Vivante en kvazaŭ-mara kulturo, kie supervivas nur la lertaj fiŝoj, oni tre baldaŭ tion ĉi lernas: kulturo ne identiĝas kun religio, kaj plu, eĉ religio ne identiĝas kun kredo kaj ties ido, praktiko. Tre ofte, religio kaj kulturo servas la individuon, kaj ne male. Cetere, ĉar inteligentaj individuoj plej ofte scias kiu utilas kaj malutilas al ili, kaj laŭ tio elektas kiel sin prezenti. Kaj fine, ĉar la homoj kaj la produktoj, kiuj igas ilin homaj (religio, kulturo, tradicio, ktp), estas senfine komplikaj. Pro tiu komplikeco, en ili abundas kaj bonaĵoj kaj malbonaĵoj. Tiamaniere, eblas al islamano individua elekti kaj ĝui la fruktojn de dekkvar jarcentoj da kulturo, literaturo, poezio kaj arto, sen, samtempe, kredi aŭ praktiki sian religion en ties tuteco. Eĉ pli ol tio mi asertas: jes, eblas ateisti, kaj samtempe identigi sin kiel islamano.

# Ĉu eblas esti juda ateisto?

*Anna Lowenstein (Britio)*



*Strat-muzikistoj en Jerusalemo, Israelo - eĉ sekulare eblas esti judo*

Kiam mi mencias la fakton, ke mi estas judo, foje iu komentas kun surprizo: "Sed ĉu vi ne estas ateisto?" Aŭ inverse. Tia demando baziĝas en la kristana vidpunkto, ke religio estas filozofio, kredo, vivmaniero, tute sen rilato al specifa popolo.

Tio estas kristana vidpunkto, ĉar la fruaj kristanoj, precipe Paŭlo, disvastigis la ideon, ke oni povas kredi je iu religio kaj konvertiĝi al ĝi, sendepende de la propra deveno. Ankoraŭ nuntempe homoj naskiĝintaj en kristana lando, inkluzive de humanistoj kaj ateistoj, nekonscie akiris tiun opinion, ne sciante, ke ĝi ne estas universala.

Judismo apartenas al pli frua epoko ol kristanismo, kiam ĉiu popolo havis sia(j)n propra(j)n dio(j)n. Se oni apartenas al la koncerna popolo, oni ĉiuokaze estas judo. La judoj ja estas popolo kun religio, sed eĉ se oni ne kredas je tiu religio, oni tamen restas judo. Israelo estas plena je homoj, kiuj konsideras sin judoj sed ne aktive sekvas la religion.

Ekverkonte ĉi tiun artikolon, mi malkovris, ke la anglalingva Vikipedio eĉ havas paĝon kun la titolo "Juda ateismo". La unua alineo de tiu artikolo tre bone prezentas la situacion:

Juda ateismo aludas al la ateismo de homoj, kiuj estas etne kaj (almenaŭ iugrade) kulture judaj. Malgraŭ la ofta miskompreno pri tiu fakto, la termino "Juda ateismo" ne enhavas kontraŭdiron, ĉar la juda identeco inkluzivas ne nur religiajn elementojn, sed ankaŭ etnajn kaj kulturajn. La emfazo laŭ la juda leĝaro pri deveno pere de la patrino signifas, ke eĉ ortodoks-judaj instancoj kun religie konservativa vidpunkto akceptas judon naskitan de juda patrino kiel plene judan.

Laŭ tiu artikolo, en Usono ekzistas

longa tradicio de judoj, kiuj ne konsideras kredon je Dio kiel esencan parton de la propra judeco. Esploro farita en 2013 de Pew Research Center trovis, ke 62% da usonaj judoj opinias, ke oni estas judo ĉefe pro deveno kaj kulturo, dum nur 15% asertas, ke temas ĉefe pri religio. Eĉ inter religiaj judoj, 55% opinias, ke gravas ĉefe deveno kaj kulturo, kaj 66% opinias, ke oni ne nepre devas kredi je Dio por esti judo.

Judismo ĉiam emfazas praktikon pli ol kredon, kaj multaj judaj instancoj diras, ke oni rajtas sekvi la judajn kutimojn eĉ se oni ne kredas je Dio. Iuj judaj nekredantoj eĉ partoprenas en diservoj ĉe la malpli ortodoksaj sinagogoj. Nur la plej ortodoksaj instancoj insistas, ke la propraj membroj nepre devas akcepti la dian originon de la Torao.

Por la plejmulto da sekularaj judoj, gravas ĉefe la identeco kun la historio kaj popolo, enprofundiĝo en la verkoj de judaj aŭtoroj (ne nepre religiaj), tradicioj pri judaj kuirarto kaj humuro, kaj emocia rilato al la judaj lingvoj: ĉefe la jida, hebrea aŭ judhispana.

Iuj juddevenaj ateistoj preferas ne konsideri sin judoj, sed tre multaj, same kiel mi, opinias, ke eblas aparteni al la juda tradicio kaj kulturo sen religia kredo.

Mi verkis ĉi tiun klarigon responde al la demando de la redaktoro: "Ĉu estante ateisto, oni povas / rajtas samtempe senti sin ano de religio?" Mia respondo evidente estas jesa, almenaŭ por mi mem. Mi volas aparte emfazi la fakton, ke ankaŭ aliaj religioj povas esti profunde miksitaj kun la tradicia identeco de iu popolo, eĉ se la koncernaj popolanoj ne plu aktive kredas je ĝi.

## Kulturo jes, kredo ne

*Gavriel Zeevi (Israelo)*

Laŭ mi, jes, ekzistas kristana aŭ hindua aŭ ĉina ktp kulturo, sen kredo je dio. La kulturoj de ateistoj estas farbitaj per kutimoj, manĝaĵoj kaj festoj, kiuj devenas de ilia iama religio, kiu iam ĉirkaŭis ilin en ilia socio. Sed tamen, tiu, kiu estas adepto de ia ajn religio ne povas esti ateisto. La baro estas: la kredo! Ateisto povas – kvankam ne devas – esti sennaciulo. Sed tiu homo ne povas esti kredanto de ia diaĵo, sendepende pri kiu temas. Ekzemplo: Ĉina ateisto povas festi la novjaron de la simioj, eŭropa ateisto la kristnaskan feston, judo la paskon – kiel nacian / kulturan heredaĵon, kaj resti ateisto. Samkiel hispana ateisto povas havi la nomon Jesuo, juda ateisto la nomon Moŝe ktp. Tiuj nomoj havas pezan ligon al la kredo, kaj certe iam estis donitaj de la praavoj al la beboj pro religiaj kaŭzoj. Sed hodiaŭ ili estas "nur" nomoj, same kiel la festoj estas "nur" festoj. Kultura heredaĵo. Tamen se homo ankaŭ preĝas dum festo, profunde kredante je la religia mesaĝo de la festo, kiel li aŭ ŝi povas konsideri sin ateisto? Kontraŭdiro... Tio ĉi estas mia opinio. Kaj kiel ĉiu opinio – disputebla.

# Hinduismo: gena aŭ kreda?

*Nyegosh Dube (Pollando)*



*Urbo Varanasi sankta por hinduoj - kredantaro kaj komunumo (Fonto: worldatlas.com)*

Mi ĉiam insistas, ke religio ne estas gena afero, sed ideologio aŭ kredaro. Tamen tutmonde infanoj efektive heredas la religion de siaj gepatroj. Jam antaŭ ol kompreni la enhavon de sia religio, infanoj estas kristanoj aŭ islamanoj aŭ hinduoj aŭ judoj aŭ budhanoj aŭ ano de iu alia religio – kaj ankaŭ specifa tipo de kristano, islamano ktp (ekz. katoliko, luterano; sunaisto, ŝijaisto). Feliĉe, ambaŭ miaj gepatroj estis agnostikuloj kaj ne edukis min kredi je iu ajn religio. Ĉiuokaze la fakto, ke ili venis de du apartaj religiaj tradicioj (hindua, kristana) certe malfaciligus ian endoktrinigon.

Tamen mia patro konsideris sin hinduo ĉar liaj gepatroj kaj gefratoj kaj aliaj familianoj estis ĉiuj hinduoj. Lia estis bramana hindua familio. En Barato oni apartenas al unu el la religiaj komunumoj. Oni estas hinduo, islamano, kristano, siĥo, parsio, budhano aŭ ĝajno kaj tio ne dependas de aktiva kredo je la dioj aŭ doktrinoj de tiuj religioj. Fakte la familia nomo kutime indikas al kiu religio oni apartenas. Barato estas tre religiema lando kaj ĉiu "aŭtomate" apartenas al unu aŭ alia religio. Mia familia nomo estas ne nur hindua, sed braman-hindua. Iam kiam mi trairis pasport-kontrolon en la flughaveno de Delhio, la kontrolisto rigardinte mian pasporton diris kun iom da rankoro "Ho, bramano." Tiu kastaneco havas neniun signifon por mi, sed klare ĝi ja havas signifon por aliaj en Barato, ĉu pozitiva, ĉu negativa.

Por miaj familianoj en Barato, mi certe estas hinduo. Neniuj el ili, eĉ sciante, ke mi ekde multaj jardekoj loĝas eksterlande, kaj ekde longe ne loĝis kun mia patro dum li vivis (li forpasis jam antaŭ 30 jaroj), iam ajn demandis pri mia religia kredo – mi estas hinduo simple ĉar mi apartenas al hindua familio. Nu, tio almenaŭ savis min de malkomforta situacio, en kiu mi devus indiki mian nekredemon! Dufoje mi veturis al Barato por ĉeesti geedziĝojn en la familio kaj tiurilate ĉeestis (kaj iugrade devis mem partopreni) diversajn hinduajn ritojn. En hinduaj familioj oni havas hinduajn geedziĝ-ceremoniojn kun bramana pastro.

Efektive, esti hinduo aŭ islamano aŭ kristano aŭ alireligiano en Barato estas simile kiel esti judo. Temas ne nur pri religio, sed pri aneco en komunumo kaj tradicio, kiel skribas Anna Lowenstein ĉi-numere pri judismo. Tamen unu granda diferenco estas ke judoj ofte konsideras sin, kaj estas traktataj de aliaj kiel, aparta etna grupo. En Barato kontraste, religianeco ne estas traktata kiel etneco, kvankam ekzistas la nocio, propagata de pakistana ideologio, ke hinduoj kaj islamanoj apartenas al du diversaj nacioj, kaj tial islamanoj devus havi propran ŝtaton. La "du-nacia teorio" estas laŭ mi granda troigo: hinduoj kaj islamanoj, kvankam ili havas apartajn kredojn, tradiciojn, festojn ktp, tamen apartenas al la sama hinda kulturo kaj socio.

Nu, bone, kiel mi sentas min? Ĉu mi konsideras min hinduo? Mia respondo estas iom komplika: ĝenerale mi ne konsideras min hinduo ĉar mi ne kredas je Dio aŭ je la diversaj hinduaj dioj (hinduoj estas samtempe monoteistoj kaj politeistoj – samtempe ekzistas por ili Dio kaj diversaj dioj kiel manifestiĝoj de Dio). Sed... en Barato, pro respekto por mia familio kaj pro agnosko de la socia realeco, se oni demandus min, verŝajne mi dirus ke mi estas hinduo, aŭ eble (depende de la situacio) ke mi estas hinduo sed ne tre religiema, aŭ ke mi devenas de (aŭ apartenas al) hindua familio. Mi hezitus diri, ke mi estas ateisto, kvankam la fama unua ĉefministro de Barato, Jawaharlal Nehru, estis senkaŝe ateisto (li nomis sin "scienca humanisto"), kaj ekzistis ateismaj skoloj en antikva hinduismo, kiel mi priskribis en la bulteno de majo 2017.

Kaj fine, kiel mi respondas al la demando, kiu estas la ĉeftemo de tiu ĉi numero: "Ĉu estante ateisto, oni povas / rajtas samtempe senti sin ano de religio?" Jes certe, se per la vorto "religio" oni celas ne nur aron da supernaturaj kredoj, sed ankaŭ komunumon kun longa historio, klara identeco kaj propraj tradicioj. Tamen, oni devas paŝi atente ĉar, kiel mi skribis en la komenco de tiu ĉi teksto, religio je la fundamenta nivelo ne estas gene transdonita. Sed religiaj komunumoj, malkiel aliaj komunumoj, ekzemple la esperantista, estas formitaj surbaze de familioj, kiuj heredigas religian identecon (kaj ofte la religiajn kredojn, sur kiuj baziĝas tiu identeco) al infanoj. Do efektive, en religiaj komunumoj, religianeco estas traktata kiel gena afero – kaj tio grandparte ne akordas kun racia mondrigardo.

# Pensoj pri ateista religianeco

*Jean-Claude Roy (Francio)*

Ĉu estante ateisto, oni povas / rajtas samtempe senti sin ano de religio? Miaopinie la demando estas tikla, sed mi havas en mi mem fortan senton de libereco. Do ĉiu laŭ sia bontrovo. Persone, mi tute ne sentas min ano de iu ajn religio, sed mi plezure kelkfoje legas kelkajn tekstojn pri la filozofio de budhismo. Kvankam mi ne estas ano de budhismo, antaŭnelonge mi partoprenis posttagmezon en kulturcentro pri budhismo rilate al la temo "teo kaj budhismo". Mi gustumis diversajn teojn kaj samtempe interesiĝis pri la historio de tiu religio.

Nu, jes, ĉiu ateisto rajtas senti kulturan proksimecon al iu religio. Tio povas okazi ekzemple kiam oni sentas amikecon kun persono, kiu estas membro de religio. Tiu homo kreas ian etan ligon inter mi ateisto kaj tiu religio. Mi kelkfoje sentis tion estante en kontakto kun diversaj kredantoj. Tamen mi ne opinias, ke eblas senti sin ano de religio estante ateisto. Simple ĉar ni ateistoj estas ekster tiuj kredoj kaj ritoj. Antaŭ pli ol dek kvin jaroj mi estis framasono kaj en loĝio estis multaj ritoj. Kelkaj en framasonismo kredas je dio, kelkaj kiel mi jam en tiu epoko ne kredis. Tio ne ĝenas la vivon en la loĝioj... sed kelkaj loĝioj estas pli religiemaj, do kiam oni volas "frapi ĉe pordo de loĝio", nepras bone elekti en kia loĝio oni volas labori.

Mi ĵus iomete legis pri Unitariismo. Laŭ mi ĝi estas kristana religio kiel la aliaj (tamen kun specifaj kredoj). Tial mi ne komprenas, kiel eblas esti membro de la unitaria religio estante ateisto.

Kiam mi estis framasono, mi estis membro de loĝio kaj havis multajn rilatojn kaj laborojn kun miaj samloĝianoj. Tial mi sentis min parto de komunumo. Mi konfesas, ke mi ne sentas min parto de la ateisma komunumo en la sama maniero, kvankam mi estas vera ano de tiu movado kaj vera frato de ĉiuj bonkoraj ateistoj.

## Forumo por ATEO-membroj

ATEO nun havas forumon en la Esperantlingva socia retejo Mia Vivo ĉe www.miavivo.net Mia Vivo estas senpaga, senreklama, nekomerca, socia retejo por esperantistoj, kiu respektas la privatecon de la uzantoj.

ATEO nun malfermis en tiu retejo sian propran grupon, kiun vi trovos ĉe: www.miavivo.net/grupoj/ateo/. Tie eblos aperigi afiŝojn, interŝanĝi ideojn, kaj diskuti demandojn interesajn por niaj membroj. Enskribiĝu tuj al la retejo kaj membriĝu en nia grupo, por ke ni komencu ĝui la avantaĝojn de propra diskutejo!

# Memore al Claude Nourmont

*Anna Lowenstein (Britio)*



*Claude Nourmont (1945-2022), refondinto kaj iama prezidanto de ATEO*

Kun granda ŝoko mi aŭdis pri la morto de Claude Nourmont, la iama prezidanto de ATEO, en la 25a de februaro.

Mi eĉ ne memoras, kiam mi unue renkontis ŝin – tio verŝajne estis dum la kongreso en Varna, Bulgarujo, en 1978 – sed ŝi estas parto de mia Esperanta vivo ekde tiam. En ĉiuj Universalaj Kongresoj kaj multaj aliaj aranĝoj mi renkontis ŝin kun ŝia edzo Brian, kaj mi apenaŭ povas imagi iri al UK kaj ne trovi ŝin tie.

Claude estis la refondinto de ATEO en la jaro 2000. Efektive, ATEO jam ekzistis, fondita de usonano Ralph Dumain, sed poste ĝi fariĝis neaktiva. Mi mem ĉeestis en tiu kongreso en 2000 en Telavivo, kiam Claude klarigis, ke se oni eniras la kongresejon, oni kredas troviĝi en religia asocio pro la budoj de diversaj grupoj kiel la katolikoj, la budhanoj, la spiritistoj ktp. Ŝi opiniis,

ke ankaŭ ni ateistoj devus troviĝi tie por montri, ke UEA ne estas asocio nur de religiuloj. Tial ŝi volis revigligi ATEO-n. Dum tiu kunveno oni elektis diversajn funkciulojn de la asocio, kaj ĉar Ralph restis formale la prezidanto, Claude fariĝis vicprezidanto.

En la nula numero de nia refondita bulteno (julio 2001), redaktita tiam de Jesuo de las Heras, mi trovas lian priskribon de tiu refonda kunveno:

> Antaŭ ok jaroj kunvenis en la Universala Kongreso de Valencio (Hispanio) pli ol dudek homoj, kiuj decidis puŝi nian asocion, kreante ĝin denove, se bezonate. Ni eĉ kolektis monon, sed finfine ni interkonsentis restarigi la tiam ekzistantan asocion. Jaroj venis kaj iris, kaj nenion novan ni aŭdis pri ATEO. Antaŭ du jaroj, en la UK de Berlino (1999), ni kunvenis en koridoro, ĉar la stagnado estis tiel evidenta, ke UEA ne konsideris doni al ni budon aŭ kunvenejon. Estas ironie, ke en religia lando Israelo, ni finfine atingis budon kaj kunvenejon. Mi devas aldoni, ke tio estas danke al la zorgo kaj strebado de Claude Nourmont, kiu ree mesaĝadis al Prezidanto Ralph Dumain kaj al mi mem. Frukto de tiu interparolado estas la restarigo de nia asocio nun. En Telavivo ni informis la interesatojn pri nia restarigo, kaj ĉirkaŭ tridek homoj kunvenis kaj parolis pri nia restarigo. Ni ankaŭ plenigis vakajn postenojn organizajn en nia asocio. Pola Radio poste informis pri la afero, do eble multaj de niaj malnovaj membroj nun scias pri ni.

Du jarojn poste, en la UK en Fortalezo, Brazilo (2002), Claude fariĝis prezidanto, kaj de tiam la asocio daŭre pluvivas kaj malrapide kreskas, kun publika kunveno pri diversaj temoj en ĉiu sekvonta UK. Ŝi restis nia prezidanto ĝis 2009, kiam transprenis tiun postenon Christian Rivière. Sed ankoraŭ poste, ŝi restis daŭre en kontakto kun la estraro de ATEO, kaj mi mem kiel sekretario ofte konsultis ŝin, ĉar ŝiaj kontribuoj al niaj estraraj diskutoj estis ĉiam saĝaj kaj utilaj. Ŝi estis ankaŭ malavara donacanto al ATEO, ĉiam aldonante plian sumon al sia regula kotizo.

Dum tiu periodo ŝi estis ankaŭ vicprezidanto de UEA (de 2004 ĝis 2013), kaj samtempe aktivis en sennombraj aliaj iniciatoj. Mi mem estis konstante en kontakto kun ŝi pro la Movada Foiro, Kleriga Lundo, aŭtoraj duonhoroj – efektive en preskaŭ ĉiu agado, en kiu mi mem partoprenis, mi trovis ankaŭ Claude. Ŝi ĉiam donis praktikajn helpojn, tiel ke ankoraŭ nun mi ofte volas turni min al ŝi antaŭ ol memori kun malĝojo, ke tio ne plu eblas.

Ni ĉiuj memoru ŝin kiel homon afablan, helpeman, laboreman, praktikan, malavaran, kiu faris tre multe por nia asocio, kaj nun terure mankos al ni.

# FILOZOFIAJ PERSPEKTIVOJ

## Kiel forviŝi ateismon per ses facilaj paŝoj



*Iam ateismo signifis ne kredi je Zeuso kaj aliaj grekaj dioj (Fonto: 123rf.com)*

En la revuo *Le Québec Sceptique* aperis interesa artikolo de François Doyon, profesoro de filozofio en Kebekio, Kanado. Tiu artikolo havis la titolon "Effacer l'athéisme en six étapes trop faciles". Dankon al Stéphane Brault (Kebekio), kiu sendis al ni tradukon de tiu artikolo, kiun ni draste mallongigis kaj adaptis por aperigo en nia bulteno.

En sia libro *Les philosophes québécois et leur défense des religions* (Kebekiaj filozofoj kaj ilia defendo de religioj) Doyon donis la nomon "dio-normigo" al la principo laŭ kiu la kredo je ia spirita dimensio de la vivo estas normala kaj natura afero. Tiu principo flankenŝovas kaj senvalorigas ateismon kaj la mankon de spiriteco. Pro dionormigo, ateismo fariĝas nevidebla en nia kulturo. Nur kiam individuo aktive deklaras sian nekredemon, aŭ estas rekonata kiel ateisto, tiu homo fariĝas videbla, kaj tiam povas fariĝi objekto de socia diskriminacio. Tial dionormigo estas ne nur persona valorsistemo, sed ankaŭ maniero pluvivigi religiojn kaj diskriminacii kontraŭ ateismo. Ĝi estas formo de socia regado super tiuj, kiuj deflankiĝas de la kredonormo.

Por nevidebligi ateismon, kredantoj uzas diversajn strategiojn. Tiu ĉi artikolo klarigas kaj kritikas ses el tiuj strategioj, la plej uzatajn de universitatanoj.

## 1. Vidi religion ĉie

Oni ofte vidas kredantajn intelektulojn defendi la ideon, ke nekredantoj dependas de religioj. Laŭ ili, la sekulara humanismo de ateistoj kaj agnostikuloj estas "religio" de niaj modernaj socioj. Ili argumentas, ke kiam nekredantoj aŭ humanistoj parolas pri homa digno, kontraŭbatalindaj maljustaĵoj, kaj libereco, ili aplikas religiajn respondojn al la fundamentaj demandoj de la homa ekzisto, kaj grandskale prunteprenas de religioj. Tio estas neakceptebla vidpunkto, ĉar ĝi forviŝas la ekziston de ateistoj kaj misfamigas ilian valorsistemon.

## 2. Aserti, ke ateismo estas religio

Iuj kredantoj diras, ke esti kontraŭ religioj estas mem religio: "senreligia religio". Laŭ ili la opinio, ke estas preferinde vivi sen religio, estas konvinko samvalora al fido je ia dio. Je la risko ofendi kredantojn, Doyon asertas, ke la prefero vivi senreligie estas kredo same blinda kaj racie senbaza kiel fido je Jesuo Kristo aŭ Alaho. Ni rimarku ankaŭ, ke tiuj kredantoj, indignaj pro la atakoj kontraŭ ilia fido, tamen mem atakas la opiniojn de ateistoj. Se ateismo estas ja religio laŭ tiuj, kiuj volas, ke oni ne kritiku la fidon de aliuloj, kial ili kritikas la "fidon" de ateistoj?

Kontraŭstari religiojn ne estas religio, sed konstato pri la propra nescio, kaj rifuzo blinde fidi ion nepruvitan. Senkredeco ne estas kredo, sed manko de kredo je Dio, kaŭzita de manko de kialoj kredi je ĝi.

## 3. Nei la sincerecon de ateistoj

Unu el la strategioj uzataj de kredantoj por eviti defendi sian kredon je la ekzisto de Dio konsistas en la neado de la sincereco de nekredantoj, laŭ la sofismo de la duobla eraro: "Vi, nekredanto, ankaŭ estas kredanto, sed kredanto nekonscia". Tio egalas al la supozo, ke neniu homo vere ekzistas sen ia formo de religio. La tezo, laŭ kiu homoj bezonas "spiritecon", restas nepruvita, sed la kredantoj konsideras ĝin certa, ĉar ĝi konvenas al ili.

Komencante per tiu antaŭjuĝo, ili rapide alvenas al cirkla argumentado: "Se ateistoj ne kredas, la kialo estas, ke neniu dio estas sufiĉe dia por ili". (Jen tio, kion iam diris al la aŭtoro unu el liaj profesoroj de filozofio.) Laŭ tiu retorikaĵo, nei la ekziston de Dio fariĝas pruvo de varma religia aspirado.

## 4. Varbi grekajn filozofojn

Jen pli malofta strategio, ĝenerale uzata inter filozofoj. Ĝi konsistas en la aserto pri preskaŭa unuanimeco koncerne la kredon pri la ekzisto de diaĵoj ĉe la antikvaj grekaj filozofoj. Tiun kredon ebligas konfuzo ĉirkaŭ la difino de la nocio ateismo. En la greka mondo kaj la Romia Imperio, tiu difino estis pli ĝenerala ol hodiaŭ. Ne kredi je la tradiciaj dioj tiam sufiĉis por esti *άθεος/atheos.* Romianoj akuzis kristanojn pri ateismo, ĉar ili forĵetis ĉiujn diojn, krom unu.

En sia libro *Battling the Gods*

(Kontraŭbatali la diojn), Tim Whitmarsh, profesoro ĉe Kembriĝo, montras, ke ateismo ne estas moderna eltrovo, sed pensaro enradikiĝinta en la antikva mondo. Malvere estas, do, ke la demando pri la rilato al la dioj estis neniam dubinda por la grekoj. La ekzisto de la dioj kaj la graveco plenumi ritojn estis brula demando dum la klasika greka antikveco.

## 5. Varbi Darvinon kaj Ejnŝtejnon

En 1998, esploro montris, ke 93% de la plej eminentaj usonaj sciencistoj forĵetis la kredon je Dio. Por firmigi sian fidon, kredantoj tamen ŝatas kredigi al si, ke Darvino kaj Ejnŝtejno neniam neis la ekziston de Dio.

Kredantoj ŝatas ripeti, ke Darvino neniel neis la ekziston de Dio. Oni aŭdas ankaŭ tiun persistan onidiron, laŭ kiu li konvertiĝis al kristanismo je sia lasta horo. Darvino parolis ja nefirme pri sia agnostikismo: “Mi kredas, ĝenerale (kaj pli kaj pli, maljuniĝante), sed ne ĉiam, ke la vorto agnostikulo korespondas pli precize al mia mensostato”. Estas tamen klare, ke Darvino neis la ekziston de bonvola intervenema dio, kapabla direkti naturon al bono. Ĉar en La Origino de la Specioj Darvino montras, ke la naturo certe ne celas bonon.

Ejnŝtejno ofte parolis pri Dio: “Mi rifuzas kredi je iu Dio, kiu ludas per ĵetkuboj kun la mondo” aŭ “Dio estas subtila, sed ne malbonintenca”. Tio taŭgas por kredantoj, kiuj serĉas sciencan garantion, sed konsiderinte la tutan ejnŝtejnan verkaron, la nura honesta konkludo estas, ke lia uzado de la vorto “Dio” estis tute metafora. “Ŝajnas al mi, ke la ideo de homoforma Dio estas koncepto neniel serioza. Mi ankaŭ ne sentas min kapabla imagi volon aŭ celon ekstere de la homa sfero.”

## 6. Alvoki la miton de la religia origino de moralo

La kampo de la moralo estas unu el la lastaj citadeloj de tiuj, kiuj defendas religiojn. En epoko, en kiu neniu prudenta homo asertus, ke religiaj tekstoj estas fonto de sciencaj konoj, unu el la lastaj argumentoj haveblaj por pravigi la taŭgecon de religioj en la 21a jarcento estas la kredo, ke religioj plibonigas la homaron. Iuj diras eĉ pli, asertante ke sen Dio, moralo tute ne ekzistus. Laŭ Dostojevski “Se Dio ne ekzistas, tiam ĉio estas permesata”.

Laŭ tiu argumento, ĉia moralo estas derivita de religi-devenaj preskriboj. Alidirite, moralaj normoj originas el ordonoj aŭ preferoj de iu diaĵo. Tion oni nomas “pravigo per dia ordono”. Laŭ tiu teorio, la bono korespondas al tio, kion Dio ordonas, kaj la malbono, al tio, kion Dio malpermesas.

Tamen, tiu formo de pravigo estas duba eĉ se oni kredas, kiel judoj, kristanoj kaj islamanoj, je diaĵo, kiu altrudas sian volon al homoj, ĉar tiam, estiĝas la jena etika kaj teologia dilemo:



***A.*** Se la dioj ordonas agon, ĉar ĝi mem estas bona, tio implicas, ke ekzistas memstara morala normo, kaj tiuokaze la aprobo de la dioj ne necesas.

***B.*** Se ago bonas nur pro tio, ke la dioj ordonas ĝin, la bono ŝajnas pure arbitra. Boneco povus esti kia ajn, kiel laŭ la Ŝario.

Laŭ la ontologia vidpunkto, la ekzisto de la moralo sendependas de tiu de Dio: la bono ne bezonas supernaturan personon por ekzisti. Laŭ la historia vidpunkto, homoj havis moralon antaŭ la elpensado de religioj. Ekzistas ekde antikveco moralaj principoj, kiujn kreis filozofio, ne religioj. Oni povus eĉ paroli pri la ŝuldo de la kristana moralo al filozofio. En sia libro, *The Sources of the Morality of the Gospels* (La fontoj de la moralo de la evangelioj), Joseph McCabe montras, ke la moralo de la evangelioj inspiriĝis grandparte de la grek-romia filozofio.

## Konkludo

En sia artikolo François Doyon provis doni raciajn argumentojn por silentigi ateistofobiulojn. Tamen li avertas, ke dionormigo estas tiel potenca, ke, laŭ li, oni vidos usonan prezidanton malkaŝe samseksemulan, antaŭ ol vidi unu malkaŝe ateistan. Li antaŭĝojas vidi aŭ unu aŭ la alian.

*Ejnŝtejno kaj Darvino - laŭ ili Dio ne gvidas la naturon (Fontoj: AP, Getty Images per nbcnews.com)*

# ĈIRKAŬ LA MONDO

## Aŭstralianoj fariĝas malpli religiemaj

Laŭ artikolo en la aŭstralia ĵurnalo *The Sydney Morning Herald* (28 junio 2022), aŭstralianoj fariĝis malpli "di-kredemaj" dum la lastaj dek jaroj. La ciferoj de la lasta popolnombrado en 2021 montras, ke kristanoj la unuan fojon falas sub 50%, dum kreskanta nombro da homoj deklaras sin "ne-religiaj".

Laŭ la informoj ĵus eldonitaj de la Aŭstralia Buroo de Statistiko, nur 44% da aŭstralianoj identigas sin kiel kristanojn. En 2016 la proporcio estis 52% kaj en 2011 61%. Kiam oni faris la unuan popolnombradon en 1911, 96% da aŭstralianoj identigis sin kiel kristanojn de iu skolo (ekz. katolika aŭ protestanta).

De post la lasta popolnombrado, la nombro de "ne-religiuloj" saltegis. 39% da aŭstralianoj nun deklaras sin "ne-religiaj". En 2016 la nombro estis 30%, kaj en 2011 nur 22%. Dum la 60aj jaroj, malpli ol 1% indikis, ke ili ne havas religion.

Laŭ la nuna evoluo, nekredantoj povus preterpasi kristanojn kiel la plej granda religia grupo en Aŭstralio, ĝis okazos la venonta popolnombrado en 2026.

Interesa kaj kuraĝiga fakto estas, ke preskaŭ ĉiuj komentoj de legantoj sub la artikolo esprimas ĝojon pro la evoluo direkte al ne-religiemo. Kelkaj komentas, ke eble la nombroj ne vere tiel multe ŝanĝiĝis, sed ke pli verŝajne, la homoj nuntempe estas pli pretaj identigi sin kiel "nekredantojn", dum en pasintaj popolnombradoj ili emis tamen enskribi iun religion, eĉ se ili ne aktive kredis je ĝi.



*Aŭstralia urbo Melburno - junuloj paŝas en ĉiam pli sekularan estontecon (Fonto: Matrix News)*

Atentu tamen, ke ankaŭ la proporcio de alireligianoj (nekristanaj) kreskas, kvankam ili ankoraŭ konsistigas nur etan onon de la tuto. Pro enmigrado el landoj kiel Barato kaj Nepalo, la nombro da hinduoj saltegis je 55% dum la lastaj kvin jaroj. Tamen, kiel procentaĵo de la tuta aŭstralia loĝantaro, ili reprezentas nur 2,7%. Temas pri 684 000 homoj.

Ankaŭ la nombroj da islamanoj altiĝas. En 2016 ili estis 2,6% de la logantaro, sed en 2021 3,2%. Ĉirkaŭ 813 000 homoj en Aŭstralia identigas sin kiel islamanojn.

*Artikolo preparita de la redakcio de Ateismo surbaze de informoj en la ĉi-supre menciita ĵurnalo.*

# Arabaj islamanoj ne plu volas fasti dum Ramadano

La plejmulto da mezorientaj ŝtatoj ankoraŭ punas publikan rompadon de la Ramadana fasto per monpunoj. Tamen, laŭ artikolo en la brita gazeto *The Economist* (30 aprilo 2022), pli kaj pli da araboj ne plu fastas dum Ramadano. Kaj fakte tiuj punoj ne ŝanĝiĝas de jardekoj, tiel ke intertempe ili fariĝis malpli altaj ol tiuj por parkado.

En Jordanio la maksimuma puno estas 25 dinaroj (proksimume 35 usonaj dolaroj), kaj en Omano 1 rialo (3 dolaroj). La instancoj plejparte ignoras rompadon de la reguloj, ĉar ili ne volas veki bruan protestadon en la sociaj retejoj.

En multaj arabaj landoj, kafejoj restas malfermitaj, kvankam sufiĉe diskrete; kelkaj atendas, ke la klientoj frapu por eniri. Eĉ okazis kelkfoje en Egiptujo, ke la polico punis manĝejojn, ĝuste ĉar ili rifuzis servi klientojn dum Ramadano.

Dum la lastaj jaroj Jordanio enkondukis specialajn permesilojn, sufiĉe multekostajn, por vendado de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj dum Ramadano, dum samtempe homoj, kiuj publike malatentas la faston, povas esti malliberigitaj. Komence kafejoj kovris siajn pordojn kaj fenestrojn per kurtenoj, sed ili ne plu ĝenas sin fari tion. Eksterlanda turisto en Amano apenaŭ plu rimarkus, ke estas Ramadano. Financa konsilanto en tiu urbo informas, ke ĉi-jare nur du el ŝiaj 25 kolegoj fastis.

Kial okazas ĉi tiu evoluo? Laŭ iuj, temas pri deziro de la ŝtatoj distancigi sin de la islama ekstremismo; laŭ aliaj, temas pri desuba premo de la popoloj, kiuj ne plu akceptas, ke la registaroj uzu religion kiel ilon de subpremado. Krome, dum la registaroj provas malpliigi sian ekonomian dependecon de petrolo, ili konkurencas por allogi neislamajn turistojn. Alia kialo estas tio, ke la ekonomia neceso kaŭzita de la pandemio devigas la ŝtatojn daŭrigi produktadon dum monato, kiu tradicie estis sufiĉe malvigla.

*Artikolo preparita de la redakcio de Ateismo surbaze de informoj en la ĉi-supre menciita gazeto.*



*Kairo - dum Ramadano oni ĉiutage fastas kaj poste festas (Fonto: Reuters / Fatima Fahmy)*

# Pli ekspozicii ol kaŝi: la germana katolik-eklezia krizo daŭras

Verdire ja estus konvene, mallonge antaŭ la laŭdira naskiĝo de laŭdira filo de laŭdira dio, denove kritiki la katolikan eklezion. Ĝi ja fakte faciligas al ni la aferojn. Denove diskoniĝis monstraj riproĉoj pri seksmisuzo, ĉi-foje en la episkopujo Trier, urbo en Rejnlando-Palatinato. Eĉ pli monstra estas la fakto, ke oni tiujn jam konis ekde tre longa tempo, sed per perfida precizeco balais sub la tapiŝon.

Konsentite, estas kolosa tasko kolapsigi aŭ almenaŭ ŝanceli konstruaĵon el mensogoj, devigoj kaj subpremoj, kiun oni dum jarmiloj starigas kaj zorge flegas. Sed se eĉ ne videblas provoj almenaŭ forigi ĝian surmuran gipson, trudiĝas duboj pri la serioza volo pri ŝanĝo. La manteleto de la kristana homfrateco jam delonge estas eluzita – des pli ĉar ĝi ĉiam estis mizera ĉifono, kiu kiel ŝnurbikino sur la strando de Copacabana pli ekspozicias ol kaŝas. Kiel ĉe la malkonstruo de bunkro, ankaŭ en tiu ĉi kazo ofte helpas nur deca ŝarĝo de dinamito.

Sed kiel povis ekesti tia katastrofo? Estus tro facile kulpigi pri la klerika mizero aron da maljunaj blankaj viroj en infanĝardinece buntaj kostumoj. Tiuj daŭre voluptaj sed intertempe lacaj virhundoj tute ne estas ĉiopovaj kaj ili eĉ ne estas iuj surteraj anstataŭantoj de la anstataŭantoj de la anstataŭantoj de la anstataŭanto de precize por tio elpensita dio – sed tute normalaj homoj. Temas pri la sama dilemo kiel ĉe multaj tutmonde agantaj oferantoj de servoj. Konsideru ekzemple la branĉon de la loĝistiko. En ĝi iu ricevas licencon pri la liverado de pakaĵoj, komisias pri tio subentrepreniston, kiu siavice komisias alian kaj tiel plu.

Tiel ekestas sistemo, en kiu tiuj tute supre ne plu povas kontroli, kion faras tiuj tute malsupre, sed ankaŭ ne vere sin interesas pri tio. Ĉar oni estas pelita de evidente prahome disponita avido je profito, de tio sekvas la strebo al potenco, el ĝi rezultiĝas la subpremo de aliaj, je la fino troviĝas ĉiam pli disvastiĝanta egoismo.

La demando ĉu tiu egoismo tamen troviĝas pli multe ĉe la komenco de la fatala ĉeno memorigas pri la demando pri la kokino kaj la ovo, sed finfine ne gravas. Gravas la fina rezulto – kaj ĝi estas terura. Kaj ĝi kontraŭdiras ĉion, kion oni iam difinis kiel kristanan idealon. Kiel tio efikas al ni? Kaj precize dum Kristnasko? Mi havas suspekton. Ĉar de kie povas veni tiu donacmanio? Ĉu ĝi vere originas nur en la deziro feliĉigi aliajn? Aŭ ĉu tiu abunda plenigado de la kristnaska donacotablo ne ankaŭ ŝuldiĝas al dozo da egoismo?

En majo ĉi-jare aperis en la usona psikologia fakĵurnalo *Journal of Behavioral Decision Making* studo pri tiu temo. Post eksperimentoj kun preskaŭ 2000 gepartoprenantoj oni venis al konkludo, kiun la tutlanda ĵurnalo *Süddeutsche Zeitung* tiel priskribis: "Kiu donacas, konstruas iasence socialan kapitalon, kiun li aŭ ŝi en alia loko denove elspezas. Temas kvazaŭ pri emocia kapitalismo." Tio ja mirinde konformas al la esenco de la tielnomata festo de la amo.

*Artikolo de Michael Herl, kiu aperis en la germana ĵurnalo Frankfurter Rundschau la 14an de decembro 2021 kaj estis tradukita (kun aŭtora permeso) de* ***Maria Merla (Germanio)****.*

# Katolikoj superregas en la usona Supera Kortumo

Je la fino de junio ĉi-jare, la usona Supera Kortumo eldonis gravan juĝon renversantan la tre faman en Usono juĝon en la kazo Roe kontraŭ Wade. Tiu decido el 1973 leĝigis la rajton je abortigo tutnacie. La nova decido estis granda ŝoko por milionoj da usonanoj, instigante manifestaciojn en multaj urboj tra la lando. De preskaŭ 50 jaroj la kontraŭantoj de Roe kontraŭ Wade, ĉefe forte religiemaj kristanoj katolikaj kaj fundamentistoj protestantaj, provas ĝin renversi, kaj fine ili sukcesis.

Estas bone konata fakto, ke la Katolika Eklezio firme kontraŭstaras abortigojn. Verŝajne multe malpli konata estas la religia konsisto de la Supera Kortumo: nekredeble, sep el ĝiaj naŭ juĝistoj estas katolikoj! Do preskaŭ 78% en lando, kie nur 25% de la loĝantoj estas katolikaj. Ĉiuj el la kvin juĝistoj, kiu voĉdonis renversi Roe kontraŭ Wade estas katolikoj, kvankam unu el tiuj nun vizitadas protestantan preĝejon pro sia edzino protestanta.

La kovrilo de tiu ĉi numero indikas kiuj estas katolikoj – post la decido (kaj la foto), unu kortumano emeritiĝis kaj estis anstataŭita per nova membro, sed neniuj el tiuj du estas katolikoj. Indas mencii, ke la usona prezidanto Joe Biden mem estas katoliko, same kiel la estrino de la Ĉambro de Reprezentantoj, Nancy Pelosi – ambaŭ kondamnis la decidon renversi Roe kontraŭ Wade.

*Teksto preparita de la redakcio de Ateismo.*



# Malpliiĝis kredo je Dio inter usonanoj

Kredo je Dio inter usonaj plenkreskuloj atingis novan malalton, laŭ la rezultoj de enketo de la firmao Gallup publikigitaj en junio 2022.

Granda plejmulto (81%) de la usonanoj demanditaj en la enketo farita en majo diris, ke ili kredas je Dio, sed tiu elcento reprezentas malpliiĝon de 6 poentoj kompare kun la stabila 87% notita en la jaroj 2013-2017. De 1944 ĝis 2011 pli ol 90% da respondantoj raportis, ke ili kredas je Dio, la cifero stabiliĝinte je altega 98% inter 1944 kaj la 1960-aj jaroj.

La Gallup-enketo trovis, ke la malkreskon en di-kredado kaŭzis junaj plenkreskuloj kaj anoj de la politika maldekstro. La kredo de ambaŭ grupoj je Dio malpliiĝis je 10% aŭ pli kompare kun la mezumo de 2013-2017 por tiuj grupoj. Ili ankaŭ estas tiuj, kiuj malplej verŝajne diras, ke ili kredas je Dio kompare kun aliaj demografiaj grupoj.

Liberaluloj (62%), junaj plenkreskuloj (68%) kaj demokratoj (72%) havis signife pli malaltajn nivelojn de kredo je Dio, dum konservativuloj (94%) kaj respublikanoj (92%) havis la plej altajn. La plej malgranda ŝanĝo en kredo okazis inter konservativuloj kaj edziĝintaj plenkreskuloj.

La enket-rezulto indikas rimarkindan ŝanĝiĝon en kredo je Dio, kvankam konsiderinda plejmulto de amerikanoj daŭre diras, ke ili havas fidon. Tamen, lastatempaj enketoj montras, ke dum altaj niveloj de di-kredado restas kun nur modesta malkresko, tradiciaj religiaj strukturoj malfortiĝas pli rapide. Gallup trovis, ke usonanoj estas multe malpli emaj ĉeesti preĝejon, fariĝi membroj de preĝejo, aŭ taksi sin konfidema pri organizita religio, ol simple kredi je la ekzisto de Dio.



*Malplena Metodisma preĝejo en Houston, Usono ĵus antaŭ Kristnasko (Fonto: AP Photo / Michael Wyke)*

*Artikolo aperinta en la anglalingva retejo TheHill.com sub la titolo "Number of Americans who believe in God dips to new low" kaj tradukita en modifita formo de la redakcio de Ateismo.*

# La Rusa Ortodoksa patriarko subtenas militan agresadon

*Nyegosh Dube (Pollando)*

La 24-an de februaro ĉi-jare, la plej granda ortodoks-kristana lando en la mondo lanĉis invadon kontraŭ la dua plej granda ortodoks-kristana lando. Dekmiloj da ortodoksaj, plejparte ruslingvaj, ukrainaj civiluloj estis mortigitaj pro rusaj misiloj, bomboj, obusoj kaj kugloj, milionoj da ili estis devigataj fuĝi eksterlanden. Multe da ortodoksaj preĝejoj estis detruitaj aŭ damaĝitaj de la rusaj invadantoj, inkluzive de la fama Sviatohirsk Lavra, monaĥeja komplekso en la Donecka provinco.

Devus esti mirige, ke tiu ĉi grandskala milito kontraŭ ortodoks-kristana loĝantaro estis aprobita kaj estas daŭre subtenata de Cirilo, la patriarko de la Rusa Ortodoksa Eklezio. Sed ne mirigas, kiam oni konsideras la proksimecon inter Vladimir Putin kaj Cirilo, inter la faŝisma Putina reĝimo kaj la reakcia Rusa Ortodoksa Eklezio – la reĝimo baziĝas sur rusa naciismo kaj imperiismo, resumita en la koncepto "Russky Mir" (Rusa Mondo), kaj la ortodoksa religio estas grava elemento de tio.

Kelkajn tagojn antaŭ lanĉi sian invadon, Putin deklaris, ke rusoj kaj ukrainoj estas la sama popolo, kion ankaŭ Cirilo proklamis post kiam komenciĝis la invado. Krome, la matenon de la invado, Putin anoncis, ke lia "speciala operacio" celas "sennaziigon". Nu, montriĝis, ke la "nazioj" efektive estis ordinaraj ukrainoj, kiuj estis amase kaj intence celataj de la rusaj militfortoj. Oni pensus, ke se la ukrainoj kaj rusoj estas la "sama popolo" aŭ almenaŭ proksimaj frataj popoloj, la rusoj ne bombardus la ukrainojn. Tamen, la vera celo estas klara: la detruado de la ukraina ŝtato kaj la ukraina nacio, sur kiu baziĝas tiu ŝtato. Kial detrui Ukrainion kaj la ukrainan nacion? Ĉar Ukrainio rifuzis subiĝi al Rusio, volis pliproksimiĝi al Eŭropo kaj la Okcidento, kaj havis demokratian politikan sistemon, kie okazis aŭtentikaj elektoj. (Indas atentigi, ke



*Vladimir Putin kaj Patriarko Cirilo - aliancanoj en agresado*
*(Fonto: Reuters)*

en la lastaj elektoj, ekstrem-dekstraj partioj gajnis nur 2,15% kaj neniujn sidlokojn en la ukraina parlamento.)

Por Cirilo la milito estas batalo kontraŭ okcidentaj valoroj kaj okcidenta kulturo. Tio kondukis al tre absurda pravigo por la milito el lia vidpunkto: la bezono kontraŭi samseksemulajn paradojn! Li asertis, ke Ukrainio intencis trudi gejajn paradojn en la parto de Donbaso nun regata de separatistoj subtenataj de Rusio! Ŝajnas, ke por li nenio okcidenta pli aĉas ol samseksemulaj rajtoj kaj la publika montrado de samseksemeco. Kiel tio pravigas sendistingan amasmortigadon de ukrainaj civiluloj estas tute preter iu ajn kompreno. Sed ĝenerale estas malfacile kompreni kiel la malakcepto de okcidenta kulturo pravigas la buĉadon de plejparte ortodoksaj ruslingvaj ukrainoj. La sola klarigo estas, ke por Putin kaj Cirilo Ukrainio estas perfida ŝtato, kiu ligis sin kun la Okcidento, kaj tial necesas puni tiun ŝtaton per plena atako kontraŭ ĝiaj civitanoj.

Cirilo ankaŭ asertis la falsaĵon, ke Ukrainio, regata de naziecaj ekstrem-naciistoj, genocidas kontraŭ ruslingvanoj en orienta Ukrainio. Tiun aserton faris Putin jam multfoje. Kvankam en militado en Donbaso ekde 2014 inter ukrainaj fortoj unuflanke kaj rusaj fortoj (rusa armeo kaj separatistoj agantaj por Rusio) aliflanke, ĉirkaŭ trimil civiluloj mortis ambaŭflanke de la frontlinio, tute ne okazis genocido kontraŭ ruslingvanoj. Ruslingvanoj troviĝas preskaŭ ĉie en Ukrainio, kaj multaj ukrainoj parolas kaj la rusan kaj la ukrainan. La prezidanto de Ukrainio, Volodimir Zelenski, estas mem denaska ruslingvano. La akuzo de genocido estis simple preteksto por imperiisma agresado. Verdire, se oni povas paroli pri genocido, estas Rusio, kiu faras ĝin kontraŭ la ukraina popolo.

Jen la kerno de la afero: la milito kontraŭ Ukrainio estas la plej nova kaj plej granda ago de rusa imperiismo, fenomeno kiu afliktas Eŭropon kaj Azion jam de kvin jarcentoj. Pollando, kie mi loĝas, spertis pli ol 160 jarojn da rusa regado kaj subigado. La supre menciita koncepto de la "Russky Mir" estas manifestaĵo de rusa imperiismo. Laŭ tiu ĉi ideologio (kiun ni povus nomi "rusmondismo"), Ukrainio plene apartenas al la rusa mondo kaj ne havas la rajton ekzisti kiel aparta ŝtato aŭ almenaŭ kiel ŝtato, kiu agas sendepende de Rusio. La rusa mondo estas sfero, kie Rusio ekzercas politikan hegemonion, kie la rusa estas la ĉefa lingvo, kie la rusa kulturo, kaj ne la malmorala okcidenta kulturo, dominas. En rusmondismo, la Rusa Ortodoksa Eklezio havas fortan pozicion kiel fundamenton de la kulturo kaj socio. Ĝi estas konservativa, kontraŭdemokratia ideologio, kiu propagas "tradiciajn valorojn" ligitajn kun ortodoksa kristanismo kaj malakceptas liberalajn, progresemajn ideojn. Nesurprize Cirilo estas entuziasma propaganto de tiu ideo, kiu verdire estas simple ilo de la rusa ŝtato por politika subpremado interne kaj imperiisma agado eksterlande.

Ekde la enposteniĝo de Cirilo kiel patriarko de la Rusa Ortodoksa Eklezio en 2009, li kultivis proksimajn rilatojn kun Vladimir Putin por gajni influon kaj materialajn privilegiojn, kaj siavice Putin uzis la eklezion, kiel gravan elementon de rusa naciismo, por plifortigi sian reĝimon. Do, ekzistas simbioza rilato inter la ŝtato kaj la eklezio, reakcia institucio, kiu favoras aŭtoritatismon, subpremadon de ateismo kaj ankaŭ de iuj minoritataj religioj (kiel priskribita en tiu ĉi bulteno en la numeroj de novembro 2016 kaj novembro 2019). La eklezio sub Cirilo donas fortan ideologian subtenon al la Putin-reĝimo per sia naciismo, aŭtoritatismo kaj konservatismo, kiuj ĉiuj estas bazaj kolonoj de la reĝimo. Cirilo fakte laŭdis la regadon de Putin kiel "dian miraklon". Kaj nun, eĉ pli abomeninde, la eklezio donas religian-kulturan-ideologian bazon por la milito kontraŭ Ukrainio.

Gravas mencii, ke krom la du ĉefaj ortodoksaj eklezioj de Ukrainio – la sendependa Ortodoksa Eklezio de Ukrainio kaj la Ukraina Ortodoksa Eklezio (longe ligita kun la Moskva Patriarkaĵo sed kiu rompis tiun ligitecon pro la invado) – kiuj ambaŭ kondamnis la invadon kaj forte kritikas Cirilon kaj la Rusan Eklezion, la saman sintenon havas diversaj aliaj ortodoksaj eklezioj kaj institucioj tutmonde, kiel la tre grava Patriarkaĵo de Konstantinopolo. En Rusio mem, grupo de 293 membroj de la Rus-Ortodoksa klerikaro subskribis malfermitan leteron, en kiu ili apelaciis por fino de la "fratmortiga milito" en Ukrainio, bedaŭris la nemeritatan suferadon, al kiuj "niaj gefratoj en Ukrainio" estis submetataj, kaj esprimis sian opinion, ke "la popolo de Ukrainio devus fari sian elekton sendepende, ne kun pafilo celata al ili, sen premo de la Okcidento aŭ Oriento".

Por Cirilo, la brutala invado kontraŭ Ukrainio estas sankta milito, krucmilito, kaj li benas la rusarmeanojn, kiuj bombardas ukrainajn urbojn kaj mortigas senkulpajn civilulojn, el kiuj la plejmulto estas mem ortodoks-kristanoj. Ilia "herezo" estas la fakto esti ukrainoj, ĉu ruslingvaj, ĉu ukrainlingvaj, kiuj ne deziras aparteni al la "Russky Mir". Unuflanke Cirilo parolas pri la sampopoleco de rusoj kaj ukrainoj, sed aliflanke li subtenas la detruadon de la ukraina nacio – tamen tiu sampopoleco efektive neas la ekziston de aparta ukraina identeco, kaj de tie estas malgranda paŝo al amasmortigado de popolo, kion ĝuste Putin nun realigas. La Rusa Ortodoksa Eklezio, sub sia patriarko Cirilo, estas malamiko de liberpensado, de homaj rajtoj, de demokratio, de nacia memdecidrajto kaj de paco. Ligante kristanismon kun rusa imperiismo, ĝi pravigas militagresadon kaj amasmortigadon de civiluloj, senkonsidere ĉu ili mem estas ortodoks-kristanoj.

*Fontoj: Deutsche Welle (dw.com), theprint.in, ndtv.com, reuters.com, Vikipedio (anglalingva), Instytut Europy Środkowej (ies.lublin.pl)*

# ATEISMO

## ENHAVO


**Vorto de la Redaktoro**

**Ateisma Vivo**

Islamo kaj senkredeco: kiel kvadratigi la cirklon 3

Ĉu eblas esti juda ateisto? 5

Kulturo jes, kredo ne 6

Hinduismo: gena aŭ kreda? 7

Pensoj pri ateista religianeco 9

Forumo por ATEO-membroj 9

Memore al Claude Nourmont 10

**Filozofiaj Perspektivoj**

Kiel forviŝi ateismon per ses facilaj paŝoj 12

**Ĉirkaŭ la Mondo**

Aŭstralianoj fariĝas malpli religiemaj 16

Arabaj islamanoj ne plu volas fasti dum Ramadano 17

Pli ekspozicii ol kaŝi: la germana katolik-eklezia krizo daŭras 18

Katolikoj superregas en la usona Supera Kortumo 19

Malpliiĝis kredo je Dio inter usonanoj 20

La Rusa Ortodoksa patriarko subtenas militan agresadon 21



Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
ateismo.bulteno@gmail.com
Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:
anna.lowenstein@esperanto.org

Prezidanto: Giridhar Rao, Barato
Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio
Sekretario: Anna Lowenstein, Britio
Kasisto: Dieter Rooke, Svislando
Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando
Grafikisto: Lautaro Croce, Argentino

Jarkotizo: 10 eŭroj (A-landoj) / 8 eŭroj (B-landoj)
Por ricevi la paperan revuon, bonvolu aldoni 2 eŭrojn
Konto: ateo-y ĉe UEA